Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoraro:
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Kunredaktoroj: *J. Fethke, H. Hurler, Max Butin.*
Literatura red.: *Zanoni.*

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tutmondo.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Vi mem plibonigos ET
se vi konstante atentos ĉi tiun angulon kaj tiel malpli-igos nian laboron

Semajna

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu **ne** per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, **Germanoj** abonu ĉe sia **poŝtoficejo.**

Kun senpaga monata „Revuo"

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 800 Kr.	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Mk.
Belga 0.50 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lir.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3½ Pc.	Franca 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Pola 120 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Bulgara 3 Levoj	Germana 80 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.50 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Rumana 3 Lej.	

Baltikanoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Neŭtrala

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur pago 4
Por **Adresŝanĝoj** ni kalkulas du numerojn de la -- -- -- -- -- abonkonto. -- -- -- -- --
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.
Anoncoj kostas po cm² 0 10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 40 gmk); rabato laŭ interkonsento.
Specialaj prezoj por ekstervicaj aŭ specialaj numeroj.

Numero 111 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 19. Novembro 1922.


Esperanto ĉie.

Se la mondo estus pli atentema, ĝi jam devus konstati, ke la **problemo de lingvo internacia esence estas solvita.** Jam dekmilo da diversnacianoj kaj diversklasuloj uzas internacian lingvon por diversspecaj internaciaj celoj. Cento da personoj eĉ jam trovas sian plenan ekziston per laboro por la lingvo internacia. Jam aperis miloj da libroj kaj libretoj, facile legataj de anoj de kvindek nacioj. Jam ekzistas almenaŭ unu ĉiusemajna internacia gazeto, kiu estas per la sama lingvo legata en kvindek landoj kaj plene subtenata de siaj abonantoj, tiel ke ĝi ne rezultigas deficiton: nia ET. Jam oni uzas lingvon internacian por tute **realaj,** komercaj celoj, por reklamo, importo kaj eksporto, kaj kelkfoje sukcesas gajni per tio belan profiton.

La ideo de internacia lingvo per ĉio ĉi tiel enradikiĝis, ke ĝi — mi riskas aserti — jam ne **estas elŝirebla. Ĝia finvenko estas nur demando pri tempo.** Eĉ se ni nun ĉesus publike propagandi por ĝi, ĝi ne estingiĝus sed fine, spite ĉion, trapenetrus la indiferenton de la mondo.

Nia merito do estas malpli, ke ni venkigas nian ideon — ĉar ĝi venkos **per si** mem, per sia propra taŭgeco, per sia evidenta racieco —, ol ke ni **plirapidigas ĝian venkon** por plialtigo de la kulturo, por beno de la homaro.

Ni trovas samideanojn en ĉiuj partoj de la vasta tero. Lastsemajne atingis nin bela foto de grupo en **Rabaŭl** (Nov-Gineo, Suda Maro), do el regiono, kien apenaŭ trapenetris la kulturo. Tie fervoraj brita kaj germana amikoj de nia ideo lernigas la internacian lingvon al areto da ĉinaj junuloj.



La unua Esperanto-grupo de Nov-Gineo.

fondita en Rabaŭl en novembro 1921. (Dua grupo por eŭropanoj startiĝis en la sekvinta monato.)

La kursanoj estas kvar ĉinoj kaj unu ĉino-melaneziano (la dua de dekstre). La kaŭranta melaneziano ne estas grupano. Instruanto estas brita s-ano *Hyde* (dekstre), verkinto de lernolibro „The Esperanto Guide". Germana s-ano *Ferd. T. Simon* (maldekstre) funkcias kiel interpretisto, ĉar la kursanoj, ne bone sciantaj la anglan lingvon, lernas Esperanton per germana lingvo.

Ni ne povas sufiĉe ĝoji pri tiu fakto. Sed malpli la fakto mem ol la konscio pri la trapenetrema forto de nia ideo ĝojigas nin. Ĝi fierigas nin kaj firmigas en ni la konvinkon, ke ni ne ĉasas fantomon, sed ke ni laboras por **reala, efektivigebla kaj certe efektiviĝonta kulturcelo.**

Lasu la mondon mokridi pri ni, pioniroj de granda ideo: venos la tempo, ke ĝi nin benos!

Saluton al vi, bravaj samideanoj en la malproksima Suda Maro! Saluton al vi, kulturportantoj en sovaĝa regiono! Kaj koran manpremon!

T. J.

Parolu, jes parolu!

Pri la artikoloj kun supraj **surskriboj en la** lastaj numeroj de ET mi multe meditis esplorante, ĉu la verkintoj pritraktis la temon laŭ ĝusteca kaj justeca vidpunktoj. La unuan mi nepre devis jesi, sed la duan? Jen al mi enprofundiĝinta en pensoj ekaperis vizio:

Viro mezaĝa, bone vestita kun sufiĉe inteligenta mieno subite staris antaŭ miaj mirantaj okuloj kaj ekparolis:

„Mi estas unu el la tiel nomitaj „nuranoj". Kial vi nin insultas? Ĉu mi kaj tiuj al mi similaj efektive ludas tiom malindan rolon en nia movado? Bonvolu aŭskulti ankaŭ mian opinion. *Audiatur et altera pars!*

Jes, estas vere, ke mi partoprenis Esp. kurson, eĉ du. Mi ne hontas tion konfesante. Sed ĉu vi eble kredas, ke mi devas okupi min pri nenio alia ol Esperanto? Ĉu vere vi supozas, ke mia libera tempo nur povas esti dediĉata al Esp. studado? Sed pripensu do: mi estas ano de ankoraŭ 4, 5 unuiĝoj, en kelkaj estrarano. La anado al la plimulto el ili estas vivgrava por mia ekzistado. La profesian federacion mi nepre devas subteni kaj interesi min pri ĝi, ĉar la plibon- aŭ malplibonstato de miaj vivkondiĉoj estas kunligita kun ĝi. Sed tio ja ne estas ĉio. La „societo por komunutila konstruado", kiun mi ekz. anas, estas ankaŭ tre necesa kaj bezonegata entrepreno en la nuntempa periodo de loĝejmizero. Krome mi estas membro en la urbestraro, ano de politika partio, de gimnastika societo, de stenografiista klubo, partoprenanto en amatora lego- kaj teatrorondo jam de tre longa tempo — — nun diru, ĉu mia libera tempo povas esti destinata nur por Esperanto. Krome mi tute ne menciis, ke mi havas familion, al kiu certe ankaŭ apartenas parto de mia postlabora tempo.

Sed mi nur priparolis unu punkton. Jen dua preskaŭ pli grava. Mi ja ŝatas Esperanton kaj konscias pri ĝia graveco, sed — pri ĝia estonta graveco. Vidu, mi estas homo bazanta sur realaĵoj. De sur tiu bazo mi ne povis ĝis nun ekkoni Esperanton rimarkinda utilo. Jes, en kursoj kaj kunvenoj estas multo da afablaj homoj, kamaradoj kaj amikoj, kaj oni tafoje tre bone amuziĝis. Sed ĉu tio dependas de Esperanto? Mi aspiras personan utilon. Kaj kvankam mi ĝis nun ne **havis efektivan utilon kaj profiton, tamen mi** estas tiom idealisto, ke mi ĉiam ankoraŭ restas ano de l' Esp. afero, insulita „nurano", kiu malgraŭ ĉio per pago de pli-malpli altaj kotizaĵoj subtenas la al ili kvazaŭ senvaloran Esp. movadon."

Li silentis. Mi jam opiniis la fantomon malaperonta, sed subite li ree ekparolis:

„Kaj fine, ankaŭ lerninte Esperanton, kie oni ĝin praktike parolas? Nenie. Mi jam vizitis multajn lokojn kun laŭdire multe da Esperantistoj. Sed eĉ ne unu mi renkontis. Mi esperis vidi ĉe ĉiu paŝo ion pri Esp. afiŝoj, vendistojn de Esp. ĵurnaloj, Esp. librejojn ktp. Nenio simila. Kaj en mian kapon venis la deviga penso: ĉu Esperanto sin kaŝas en mustruoj? Do, pro kio ĝin paroli? Ĉu kun konatuloj same pensantaj kiel mi? Aŭ ĉu kun nia prezidanto sole? Sed al tiu nura celo ne profitas lernado kaj ekzercado."

Kaj li malaperis.

Ekvekiĝinte mi nur malrapide rekonsciiĝis pri mia songtravivaĵo. Jes, tio estis laŭviva tipo el la „nuranaro", pardonu, el „nia diligenta kolegaro". Oni ne sukcesas konvinki tiujn pri la malpraveco de iliaj sofismoj kaj neĝustaĵoj. Ili tiam nur ĉiom jesos, malon pensos kaj — kio estas pli malbona — ankaŭ faros. Ni konsolu nin, ke tamen ekzistas malgranda aro de veraj Zamenhofaj disĉiploj; ĉiam ni memoru la eldiron de D-ro Nitobe: Ni ne tro esperu, pli ni laboru!

Jobo.

Grava Servo per Esperanto.

Somere mi ricevis leteron de la Del. de UEA en Gumersbach, s-o F. Köditz, kun aldono de la letero de alia Esperantisto, Prof. E. Riedel (Rendsburg). Tiu ĉi lasta priskribas, ke lia amiko dum la mondmilito marŝis kun sia kompanio de Kaunas (Kovno) al Vilno kaj tra la vilaĝo Evje. Ili noktis en la rusa ortodoksa preĝejo. La soldatoj tie trovis valorplenan biblion kaj komencis forŝiri la arĝentajn ornamaĵojn. La oficiro forprenis la biblion, gardis ĝin kaj nun deziras ĝin redoni al la preĝejo kaj ĝia anaro.

Do, ili sin turnas al mi por ekscii. kiamaniere kaj al kiu la libro estas sendota Kompreneble mi tuj proponis mian peradon en la afero.

Post kelkaj monatoj mi efekt ve ricevis la sendaĵon. Estas bela, grandformata libro, enhavanta la kvar evangeliojn en antikva slava lingvo. Ĝi **estis presita en 1805, velurbindita en 1898 de** kelkaj membroj de Evje'a anaro, kies nomoj estas enskribitaj sur la unua pago, ankaŭ la nomo de tiu, kiu estis farinta la arĝentajn ornamaĵojn.

La belan trovitaĵon mi transdonis al la ĉefa ortodoksa pastro en Kaunas. Oni facile povas imagi lian ĝojon.

Sed jen la daŭrigo. La filo de tiu ĉi pastro, reveninta antaŭ kelkaj semajnoj el Rusujo estis rusa oficiro kaj dum la milito estis interalie en Orienta Rusujo. Tie li foje vizitis luteranan preĝejon, kiu estis multe suferinta pro artileria pafado. La orgeno estis rompita, kaj en ruboj de l' altaro la oficiro rimarkis brilantan objekton. Li ĝin eltiris. Estis la kaliko uzata dum sankta vespermanĝo (Abendmahlkelch) iom kurbiĝinta kaj trapafita ŝajne per pafajspilto. — La oficiro zorgeme konservis la kalikon, kun malfacilajoj realportis ĝin al Rusujo kaj nun, ekvidinte ke mi transdonis al lia patro la biblion, li estis feliĉa povante enmanigi al mi la preĝejan kalikon, pet-

El letero el Nov-Gineo

skribita al s-o Butin, kunredaktoro de ET.

Rabaŭl, 24. aŭg. 1922.

. . . . .

Nun iom da novaĵo pri la Suda Maro.

La loĝantaro de Rabaŭl estas tre kosmopolita: eŭropanoj, ĉinoj, japanoj, malajoj, kaj kompreneble indiĝenoj. Ĉiuj havas propran parton en la urbo; sed kvankam la ĉinoj okupas la plej malgrandan areon, ili ampleksas preskaŭ duonon el la loĝantaro. Iliaj profesioj estas aŭ butikistoj, ĉarpentistoj aŭ maŝinistoj. Japanoj ĉefe estas ŝipkonstruistoj, kaj la sola kinematografo apartenas al japano. La malajoj laboras kiel skribistoj en oficejoj, kaj eŭropanoj estas la „elegantaj sinjoroj". Apenaŭ necesas diri, ke indiĝenoj estas servistoj por ĉiuj, sed ili interesas min pli ol la aliaj rasoj. Ili sin vestas nur per lumbotukoj, kaj en urboj la virinoj havas bluzojn ankaŭ. La koloro de la haŭto diferencas laŭ la regiono de ilia deveno, ekzemple ĉi tieaj estas brunaj kaj tiuj de la Salomon-Insuloj preskaŭ nigraj. La staturo ankaŭ varias: marbordanoj estas altaj, sed montanoj — malgrandaj. Dimanĉe kaj festtage ili ŝmiras siajn vizaĝojn per frapantaj koloroj: ruĝa, blua, verda, flava kaj blanka, kaj tinkturas la harojn per unu el tiuj koloroj aŭ per kalko. Plie, folioj ofte estas volvataj ĉirkaŭ la korpo, donante rimarkindan aspekton. En kelkaj partoj de la insuloj, nome Admiralitat-Insuloj kaj distriktoj sur la granda insulo Nov-Gineo ili ankoraŭ estas sovaĝaj, ne amante la blankulon, kvankam kanibalismo ne okazis dum longa tempo.

Unu el la fenomenoj tie ĉi estas tertremoj, kiuj ofte okazas. La dauro estas de kvin sekundoj ĝis iam unu minuto aŭ pli longe, sed la plej multaj ne estas fortaj. Oni sentas subitan skuiĝon, la „bangalo" tremas, la planko similas „spektaklan fervojon" (montan kaj valan fervojon), ligno knaras (ĉiuj domoj estas el lingno), mebloj vibras, kaj ofte, laŭ severeco, vazoj, bildoj, lampoj kaj fajenco falas. Eĉ akvo en lavkuvoj versiĝas. Je la 1-a de januaro 1916 ne nur multaj domoj estis difektitaj kaj kelkaj homoj vunditaj, sed ŝoseo inter ĉefturo kaj insulo apud Rabaŭl tute malaperis sub la marnivelo. La kaŭzo de tiuj tremoj estas apudaj krateroj nomitaj „La Patrino" kaj „La Filinoj", kiujn oni opinias estingitaj. Mi dubas pri la estingiteco.

Alia naturfenomeno estas apero de varmaj fontoj en la maro kaj ĉe marbordo. Tiuj estiĝas pro la sama kaŭzo — vulkanoj. La ĉirkaŭa akvo ne nur estas varma sed ofte varmega kaj sulfura kaj efikas sur tutajn bajetojn. Kun aliaj Esperantistoj mi regule banas min en ĝi, escepte post tremo, kiam la akvo tro varmiĝas.

Antaŭlastan dimanĉon aro de ok konatoj grimpis „La Patrinon" (alteco 692 metroj), la altegan monton en la distrikto, kaj havis bonegan panoramon de sur ĝi. Oni povas vidi grandan parton de la „Gazela Duoninsulo" norda parto de Nov-Britujo (New Britain, antaŭe Neu-Pommern) — kaj la marbordon de Nov-Irlando (antaŭe Neu-Mecklenburg). La flankoj de tiu monto, kiu estas konusa, havas angulon de la bazo de preskaŭ 45 gradoj.

Nun sufiĉe por hodiaŭ.

Ferd. T. Simon,
Vicdel. de UEA.

Al paŝanta somero.

Orig. *August Jôger.*

1.

Mi estas malfeliĉa.
Vi tion ne povas kompreni, mia kara, mia kara . . .
Kion povas skribi mi por vi, kion povas mi diri, se mi sentas, ke mia koro sin versas per larmoj de mia animo?
Kaj kion mi povas deziri, pri kio sopiri, se mi scias, ke nenio plenumiĝos? —
Mi estas malfeliĉa, kaj vi en malproksimeco ne povas kompreni mian malĝojon.
Ho vi, mia kara, kara, sunradia somero!

2.

Kian vojon devas flugi mia revo, kian direkton devas havi mia senco senlaca?
Pluvas, pluvetas, kaj gutoj faladas sur foliojn de arboj en nokta ĝardeno.
Melankolie, melankolie . . .
Cilk — colk — colk — pac . . . pac . . .
Venteto blovas; ĝi rapidiĝas al nordo.
Nuboj nevideblaj kaj malĝojaj kiel miaj pensoj — al nordo.
Ja estas tiel melankolie, tiel mallume ĉirkaŭ mi. — Kaj pluvas, pluvetas:
Cilk — colk — colk — pac . . . pac . . .

3.

Se mi povus vidi nur unu stelon!
Kaj se mi nur unufoje povus vidi viajn okulojn, unufoje vian rigardon — mi estus konsolita.
Sed ne. — Mallumo estas netravidebla, kaj nuboj — nuboj! . .
Mia lampo lumigas tra fenestro nur rustajn foliojn en mia ĝardeno kaj diverskolorajn astrofiorojn, kiujn mi tre ŝatas, ĉar per ili ekkrietas lastfoje beleco de l' vivo. —
Ha, mi rememoras vian rigardon, rigardon profundan, en kiu brilis konfideco.

4.

Rusta estas foliaro en mia ĝardeno, rusta kaj ruĝflava. — Sed tute ruĝaj estas memorajoj pri vi, malhelruĝaj kiel tiu floro disrompita sur la florbedo.
Malĝoja estis tiu momento, kiam ĝi per ventego disrompiĝis! Jam tiam sin versis mia koro per larmoj!
Kaj jam tiam ploregis nuboj de l' ĉielo.
Sed tiel malĝoja, tiel melankolia estis neniam iu, kiel nun mi, je hodiaŭa malfrua vespero.
— Cilk — colk — colk — pac . . . pac . . .

5.

Sad ĉiam, ĉiam, ĉiam restos tiu floro ruĝa, neniam ĝi velkos, neniam ĝi mortos — ĝi, la lasta floro, kiun donacis vi al mi, kiam ni disiris! . . .
Kiom donacus, ho kiom donus mi por denove renkonti vin, vin mia sunradia!
Denove vin, mia kara, kara! . .

Babelo.

De J. Gyenes.

El *„Voĉo de l' Popolo" (Népszava)*, Budapest.

. . . La homoj tre disvastiĝis sur la tero, kaj ĉiu familio havis alian buŝon kaj alian parolon sente kaj vorte. La malboneco enridaĉis en iliajn animojn, kaj tiel parolis unuj al aliaj la anoj de la sama familio:

„Jen ili havas kaj ni ne havas; ni forprenu de ili perforte!"

Sed ili timis tion fari, ĉar regis super ili la Dio de la Amo.

ante siaflanke, ke mi prenu sur min la penonĝin havigi al la ĝusta preĝejo. Bedaŭrinde li forgesis la nomon de tiu urbeto. Al li ŝajnas, ke tio okazis en Buddern aŭ Gross-Rominten.

Nun, ricevinte la kalikon, mi tuj (8. X.) skribis al delegito de UEA en Königsberg pri la afero, petante ke li presigu koncernan artikolon en kelkaj germanaj ĵurnaloj, por ke tiamaniere troviĝu la vera posedanto. Li respondis, ke li faros tion, do mi esperas, ke mi baldaŭ povos forsendi la kalikon. Ĝi estas 28 cm. alta, havas diametron de 12 cm.; ĉu ĝi estas arĝenta — mi ne povas juĝi, sed orumita ĝi estis meze, kaj sube interne ĝi havas surskribon jenan: Mar. Eli. Rüdigerin. 1769.

Mi devas ankoraŭ klarigi, ke nun la evangelio jam estas en la manoj de la Evje'a pastro, de kiu mi ĵus ricevis skriban dankesprimon, kiun mi samtempe forsendas al s-o prof. Riedel.

Kaunas, Litovujo, 31. X. 1922.

P. Medem, Del. UEA.

123 mortintoj!

D-ro V. Austerlitz en Bardiov, Ĉeĥoslovakio, sendis al nia redaktoro sekvantan leteron:

Kun vera ĝojo mi legis vian artikolon „Iom pli ol recenzo", kiun mi tute aprobas. Mi vere ne komprenas, ke ĉiam kaj ĉie troviĝas kuraĝegaj riskemuloj, kiuj fondas novan gazeton, spite de tio, ke nun jam preskaŭ dekkvinjaraj spertoj tiajn entreprenojn malaprobas. Viaj konsiloj estas sendube valoraj kaj trafaj; sed la interesataj entreprenantoj vin verŝajne suspektados, ĉar vi, kiel gazeteldonanto, estas do nature partia.

Mi do, kiel tute seninteresata, volas rimarki, ke mi posedas kolekton da 172 (diru kaj legu: cent sepdek du) ĉiuj malsamaj Esperantaj gazetoj, el kiuj nuntempe nur 49 aperas kaj 123 ĉesis! Mi nur kelkajn citas alfabete: Alĝeria Stelo, Antaŭen, Antaŭen Esperantistoj, Arbeider-esperantist, Arbeiter-Esperantist, La barbiro, La bela mondo, Bohema Revuo Esperantista, La bontemplano, Deutschösterreichischer Esperantist, Dana Esperantisto, La Duonmonata, ktp. — ĉiuj ĉi „nirvaniĝis"! Ankaŭ la estintaj beletristikaj kaj literaturaj gazetoj preskaŭ ĉiuj malaperis. Kaj tamen ĉiutage novaj eksperimentuloj!

Tutkore mi deziras sukceson al la „Literatura Mondo", sed mi timas, post mallonga tempo sekvos la kondolencesprimo.

Int. Scienca Asocio kaj Int. Scienca Revuo.

Ĉe la dissendado de la unua numero de Int. Sc. Rev. al la 500 abonantoj kaj al multaj interesatoj okazis la bedaŭrinda fakto, ke kelkaj abonantoj ne ricevis la numeron, ŝajne pro nesufiĉa adreso. Ni konsilas al ĉiu abonanto **paginta**, kiu ĝis ricevo de la hodiaŭa numero de ET ne ricevis la numeron skribi poŝtkarton al s-o D-ro Döhler, Riesa (Elbe), Germanlando. Ni atentigas speciale, ke nepaginto ne rajtas plendi, kaj ke la dua numero, nun preparata, nur estos sendata al fakte paginto j.

Do rapide pagu, se vi ankoraŭ ne faris tion, per la delegitoj ĉiulandaj! Ne sendu malpli grandan sumon ol decidite! Pripensu, ke la kotizoj por la malbonvalutaj landoj pageblaj en germ. mk. nur validas ĝis 30. novembro!

Int. Scienca Asocio bone evoluas kaj entenas hodiaŭ 280 unuopajn membrojn kaj 120 korporaciajn membrojn, kiuj ĉiuj pagis.

Se ĉiu membro faros sian devon varbi unu novan membron, ni havos je jarfino minimume 500 paginta jn membrojn, kaj tiom ni bezonas.

La diverslandaj delegitoj estas petataj sendi la enspezitajn kotizojn al la kasisto, ĉar eĉ la bonvaluta mono perdas valoron por ni de unu tago al alia pro la terure altiĝantaj kostoj por ĉio ajn.

Redaktejo kaj Eldonejo de Int. Sc. Revuo.

Kaj tiel parolis ĉiuj familioj; poste ili interparolis, venki la potencan Dion.

Ili iris unu kontraŭ la alia, kaj de tago al tago malpliiĝis la potenco de Dio, sed ili konstruis grandegan turon, novan Babelon, ke ĝi atingu la ĉielon.

Kaj iliaj korpoj estis bruligitaj brikoj por ĝi kaj ilia sango la mortero...

Sed malsupren venis la Amo, ke Li vidu la turon, kiun konstruis kontraŭ Li la filoj de la homo. Kaj Lia koro kuntiriĝis, Liaj okuloj eksploris, kiam Li vidis, kiel granda ĝi jam estas.

Kaj Li parolis: Estu via puno inda al Mi!

Tiam la Ĉiam-estanta Amo ektuŝis la lipojn de la diversaj familioj kaj formis ilin unu kiel la alian; Li ekkaptis iliajn voĉfadenojn kaj ludis sur ili, kvazaŭ sur harpo, dolĉajn melodiojn; Li ekskuis iliajn korojn en iliaj brustoj.

Kaj jen: la homoj komprenis unu la alian, ili parolis unu lingvon, kaj ilia koro sentis la doloron ŝirantan la aliajn.

Kaj ili kisadis unu la alian, kaj ili ploregadis kliniĝante sur la ŝultrojn unu de la alia...

...Kaj la tero fariĝis unu familio, unu buŝo kaj unu parolo; sente kaj vorte. La Amo regis super ili, kaj sen postsignoj malaperis la Babelo de malboneco, konstruita per iliaj karno, ostoj kaj sango...

El la hungara lingvo tradukis
Vera Nurhom.

Korekto.

En nia avizo en la dekstra titolangulo de n-o 110 estiĝis eraro: anstataŭ „Sciencan Revuon" bonvolu legi „Sciencan Asocion". Tamen ankaŭ koncerne „Sc. Revuon" skribu al ni nur pri administraj sed ne pri redaktaj aferoj. Ĉion, kio koncernas „Sc. Asocion" kaj la redaktadon de „Sc. Revuo", direktu al D-ro Walter Döhler en Riesa.

Antonio Canova


(1757—1822).

Unua Centjaro de la morto de la fama itala skulptisto.

Dum en centra Eŭropo la sepjara milito komenciĝis (1757), kaj la pereonta respubliko de Venecio ekfestis longan karnavalon, en modesta domo de ŝtonhakistoj en la vilaĝo de *Possaguo* (50 km je Venecio) naskiĝis *Antonio Canova.*

Okaze de festeno en honoro de Venecia senatano *Falier,* la dekjara knabo, helpante la kuiriston, ekmontris sian lertecon per butera leono (la emblemo de Venecio), kiu multe mirigis la kunmanĝantojn kaj instigis la domestron studigi la junulon ĉe tiam tre konata skulptisto *(Torretti).* Rapidege Canova per firma volo kaj sen deflankiĝoj multe lernis en la skulptarto kaj helpis la instruiston en iaj komisiitaj statuoj.

Grave influis en lia estonta disvolviĝo la vizitado de Venecio, la atenta studado de multaj artaj verkoj kaj precipe de gipsaj grekaj kopioj en la palaco de senatano *Farsetti* (kiu nun estas Venecia komununa sidejo). Iom da famo al li donis grupo, kiu montris Dedalon gluanta la flugilojn al la filo: precipe la flugiloj de Ikaro plaĉis al la publiko, kaj la ricevita mono permesis al la juna aŭtoro veturi al Romo (1779). La beleco de la ĉefurbo, la amaso de grekaj kaj romaj statuoj, la amo por antikvaĵoj post la studadoj de *Winckelmann* kaj la akvafortoj de *Piraulsi* potence allogis la junan artiston, kiu poste, helpata de samlandanoj, loĝas en la urbodum multaj jaroj de sia vivo.



Herkuleso ĵetas en la maron Likas'on.



La masko de Antonio Canova.

El „La Tribuno" Roma.

En la XVII-a kaj XVIII-a jarcentoj triumfis la baroka stilo, sed la verkoj de *Bernini* kaj de *Borromini* oni komencis kritiki precipe pro la tro movoplenaj kurbaj linioj kaj la ne maloftaj strangaĵoj. Canova komprenas la neceson ŝanĝi la vojon, redonante al la skulpturo per imitado de la antikvaj modeloj la eblecon esprimi la belon kaj la forton, la amon kaj la heroecon. Sed ĉar li vivas je la fino de XVIII-a jarcento kaj admiras la grandajn majstrojn de itala renesanco, tiel lia arto fariĝas preskaŭ sintezo de la serenaj kaj simplaj antikvaj modeloj, de la renesanca freŝeco kaj de la ĉarmo de la milda *Settecento* (XVIII. jarc.). La novan stilon li vidigis en la tomboj de la papoj Klemento XIV (1787) kaj Klemento XIII (1795) (tiu ĉi en S-ta Petra preĝejo en Romo): ambaŭ verkoj pliigis lian famon, sed la longa laboro per trepano kaŭzis sur lia brusto dolorajn vundojn, kiujn li glore montris al la amikoj kvazaŭ militajn. Sed li ne haltis en la laborado: en la Eŭropaj muzeoj estas de li pli ol cent statuoj, ĉiam laŭ la sama skulpta maniero, grandaj kaj malgrandaj; ĝuste por montri al la konkurantoj, ke li kapablas skulpti ankaŭ grandajn statuojn, li reprezentis Herkuleson, kiu post la surdorsigo de la venenita ĉemizo ĵetas en la maron Likason. En Parizon Napoleono lin vokis por fari sian ŝtonportreton kaj poste tiun de imperiestrino *Maria Luisa;* lia belega fratino *Paolina Borghese* pozis en Romo por la statuo de venkanta Venuso. Aŭstraj, anglaj kaj rusaj princoj komisiis al li skulpti multnombrajn verkojn (precipe fama estas la blindulo en la tombo de *Maria Cristina* en la Aŭgustenana Preĝejo en Vieno kaj la funebra monumento de Stuart'oj en Romo), la Papo donis al li dukan titolon, tamen Canova ne malhumiliĝis, sed donacis parton de la gajnoj al artaj akademioj kaj al malriĉuloj kaj starigis belegan preĝejon en la naskiĝa vilaĝo, en kiu poste li estas entombigita.

Post longa suferado en la lastaj jaroj de sia vivo, li mortis (1822) en Venecio, kiu volis konservi lian dekstran manon en la Akademio kaj lian koron en la Maŭzoleo antaŭ ol doni la korpon al la naskiĝa vilaĝo.

* * *

La epoko, en kiu li vivis kaj verkis, estis unu el la plej teruraj en la moderna historio pro la flamoj de revolucio, kiu transiris la francajn landlimojn, pro la Napoleonaj militoj, kiuj portis tra Eŭropo, kun la flugo de la imperiaj agloj detruon kaj lukton: epoko glora kaj tragika pro venkegaj triumfoj kaj malvenkegaj faloj, epoko, en kiu la tronoj elfalas kaj la nova societo rekonstruiĝas. Sed Canova, kiu kreis verkojn eterne belajn, ŝajnas ne esti aŭdinta la ĥon de la teruraj uraganoj, kvankam ili ofte tuŝis la pordon de lia trankvila studejo. Nur la geniuloj (kiel ekzemple *Goethe,* kiu vivis en la sama epoko) povas sin levi en superan idealan sferon, kie la tumulto de homaj pasioj ne influas. La partoprenado al historiaj okazantaĵoj (ekz. en Parizo, kien li iris por rehavi la ĉefverkojn prenitajn en Romo de Napoleono) kaj la interrilatoj kun regnestroj, princoj kaj kondukistoj (ekz. kun *Wellington)* havas nenian signifon por la arto de Canova, ĉiam revanta pri belo kaj pli ŝatanta la heroojn de Plutarko kaj de Hombro ol la triumfantojn de cent napoleonaj venkoj.

Elio Migliorini.

Al la „naturamikoj"-Esperantistoj!

Ĉu vi ankoraŭ neniam meditis pri la rilatoj inter Esperanto kaj la internacia turista unuiĝo »la naturamikoj«? Certe estas konsiderinda nombro da Esperantistoj inter la membraro de la naturamikoj. Jen, gekamaradoj, etendiĝas antaŭ ni vasta kampo plugota, en kiun ni povas meti niajn verdajn semojn. Sendube la laboro ne estos vana, ĉar la unuiĝo ja bazas sur internacia fundamento, la ideoj kaj idealoj tutmondaj ne estas tiel fremdaj kaj nekonataj al la plejmulto de la membroj kiel ekz. en ekskluzive landaj societoj. Ni nombras ĉirkaŭ 200000 anojn. Kvankam la plimulto el ili estas germanlingvanoj, tamen troviĝas inter la aliaj hungaroj, ĉeĥoj, sudslavoj, italoj, svisoj franclingvaj, francoj, norvegoj kaj amerikanoj. Se la unuiĝo daŭradas kreski en same rapida maniero kiel ĝis nun, komuna pera lingvo neŭtrala montriĝos nepra bezonaĵo. Nu bone, ni ekagu! Ni spertkonas la altajn homarajn celojn de la unuiĝo, ni estas konvinkitaj pri la freŝa, saniga kaj kleriga forto, kiu kuŝas en la amo al la ĉiupatrino naturo kaj ĉiam pligrandiĝas per konstanta gaja migrado en pura aero sub la ĉiela tendo.

Kiam vi legos numeron 7/8 de nia organo »La naturamiko«, vi trovos sur la lasta kovrila paĝo artikoleton surskribitan »Esperanto«. Tie estas dirate, ke la estraro ja ekkonas la gravecon de mondhelplingvo Esperanto, tamen pro okupateco pri multaj aliaj turistaj aferoj kaj demandoj ne povas sufiĉe ĝin priatenti. Kiu deziras pli detalajn informojn, petu ilin de GEA (Germana Esperanto-Asocio) en Dresden-N., Hauptstr. 38.

Nun, gekamaradoj naturamikaj, pruvu al la centra oficejo en Wien, ke inter la »naturamikoj« jam troviĝas granda aro da Esperantistoj, rilatante al supre nomita artikoleto kaj postulante enkondukon de Esperanto en praktikan servon de nia migrada movado. Precipe vi, ekstergermanlandanoj, skribu nur Esperante aŭ almenaŭ dulingve. Plue voĉdonigu en viaj grupoj rezolucioj n, kiuj esprimu al la plej proksima ĉefkunveno de la tutunuiĝo la deziron, ke Esperanto nepre estu uzata por propagandi la unuiĝon kaj ĝiajn tendencojn en eksterlando. Kredu, ke la estraro jam nun favora al nia lingvo, volonte cedos al firma deziro.

Tute ne malgrave ankaŭ estas, de tempo al tempo sendi artikolojn pri Esperanto al la distriktaj sciigiloj. Ĉi tiuj ĝenerale povas presi ilin pli facile ol la komuna organo, kiu konstante batalas kontraŭ paperkariĝo kaj valutmizero en Aŭstrujo.

Eke, naturamikoj! Per vortoj kunigitaj kaj senĉese atankantaj ni venkigos Esperanton ankaŭ sur ĉi tiu kampo.

„... eĉ guto malgranda, konstante frapante traboras la monton granitan."

Montano
Esp.-grupo „Altrejno", Waldshut
(Baden, Gurtweilerstr. 42, Germ.)

Policistoj.

La letero kaj cirkulero el Budapest de la ĉefo de de Hungariaj policistoj, la direktoro de publika ordo, s-o Marich, la kelkdeko da numeroj de „La Policisto", kiel ankaŭ la letero de la Dresdena ĉefo de kriminalaj policistoj, s-o Pohle — ĉio supre dirita donis la eblecon starigi Esperanton sufiĉe forte inter la policistoj kaj en la administra fako de la Ministrejo por internaj aferoj en Latvio.

Precipe niaj fervoraj samideanoj Krauze kaj Grot ekklopodis, kvazaŭ ilin iu salajris.

La Ministrejo por internaj aferoj komisiis Edgaron Grot fari raporton pri „Esperanto en la institucioj por la publika ordo kaj inter la policistoj". La lekcio okazis en la polica lernejo. La katedro estis ĉirkaŭvolvita per Esp. standardo, estis aranĝita ekspozicio de Esperantaĵoj. Post la sukcesplena parolado en kurson enskribiĝis 40 policistoj. Membriĝis multaj en la Tutmondan Esp. Polican Asocion kaj estis sendita Madridon salutletero al la ĝenerala direktoro de la publika ordo en Hispanio, la ĉefo de hispanaj policanoj, la dekkvin-ordena kavaliro s-o Millán de Priego, kiu interalie estas konsiderata kiel la estonta prezidanto de la Tutmonda Policista Ligo. La salutleteron subskribis 62 policistoj: la ĝenerala direktoro de la publika ordo, la ĉefo de latvaj policistoj, lia ekscelenco s-o Dambekalns kun 2 helpantoj, la estro de polica lernejo, la kriminalestro, la direktoro de fervoja ordo en Latvio, s-o Grigarovič, la fervojaj policestroj de la urboj: Jelgava, Liepaja, Daugavpils, Valmiera, Rezekne, Vecgulbene, aliaj estis gardistoj.

La tutmonda policista kongreso okazos 1923 en Madrid. Grandan dankon ŝuldas la Esperantistoj al la Hungaria polica direktoro, s-o Marich, pri lia senlaca kaj sinofera laboro por, per kaj pro Esperanto.

Nova Marŝo.

Kune antaŭen, brave, konkorde,
Fratoj laŭ sama spirito,
Ni laboradu pace kaj orde
Por kre' de l' Monda civito. } Dufoje.

Meze de l' svarmo lukta malama
Estu ni pureanimaj,
Kaj ni aspiru al la ĉiama
Paco en landoj senlimaj. } Dufoje.

Ni amas niajn gepatrojn karajn
En naskolandoj malsamaj,
Kaj ankaŭ amas ni solidarajn
Fratojn laŭ celoj homamaj } Dufoje.

Do, ni antaŭen iru kuraĝe
Al kara celo proksima,
Kaj ni preparu milde kaj saĝe
Homojn por vivo senkrima. } Dufoje.

Originalo de P. Stojan, L. K. (Jugoslavio).

La donaco de l' fantomsenoj.*)

Svisa legendo.

Iam, kiam paŝtistoj kun la brutaro estis forlasintaj Uri'an**) alpon, post fino de l' somero, montriĝis, ke oni forgesis melkseĝeton kiun oni nepre bezonis. Ĉar, laŭ kredo de l'alpanoj, al tiu kiu vizitas en aŭtuno jam forlasitan alpkabanon, okazos malbono, neniu el la senoj volis iri por realporti la necesan objekton. Fine oni igis paŝtisto-knabon supreniri al la kabano. Jam ekestis noktmezo, kiam la knabo atingis la silentan alpon. Li eniris la forlasitan kabanon kaj kun teruro ekvidis ĉirkaŭ fajrujo tri grandegajn senojn; unu el ili ĵus sidis sur la melkseĝeto, kiun li devis preni kun si. La timigaj grandeguloj estis metintaj grandan kaldronon super helbrulanta fajro por fari fromaĝon. Unu el la fantomoj demandis la tremantan knabon, ĉu li deziras trinki kun ili kazeolakton. Opiniante, ke estus tre riske rifuzi al li la proponon, tiu jesis per la kapo. Sed kia teruro lin ekkaptis, kiam li remarkis, ke la seno ĉerpas el bolanta fluidaĵo diversajn kazeolaktojn, tiel ruĝan, blankan kaj nigran. „De kiu lakto vi deziras trinki?" demandis lin unu el la tri. „De la blanka," respondis la juna seno kaj ricevis laŭ deziro. Ektrinkante li perokule esploris trans la randon de la trinkvazo la strangajn personojn, dum li malrapide, gluton post gluto, ensorbis la eksterordinare bongustan trinkaĵon. La fantomoj estis vestitaj per la ordinara sena kostumo, sed ili estis de kolosa staturo, kaj el iliaj palegaj vizaĝoj fulmis malhelaj moviĝemaj okuloj.

Kiam li estis trinkinta, unu lin alparolis: „Vi miris pro la diversaj koloroj de la kazeolakto. Sciu do: la ruĝa signifas la, dum somero malbone uzitan lakton, la nigra, ke vi senoj sur la alpoj tre ofte blasfemis, kaj la blanka, ke vi ĉiuj bone prizorgis la brutaron kaj bone mastrumis la tutan alpon. Kaj ĉar vi estas brava kaj Dionamanta knabo, kiu ne sennecese revenis sur la alpon. vi nun rajtas elekti unu el tri artoj: bele kanti, bone jodli, aŭ harmonie ludi la fluton. „La juna seno elektis la duan. „Estu laŭ via deziro," diris unuvoĉe ĉiuj tri, „sed nun iru dormi sur la fojno."

La suno jam leviĝis tre alten, kiam la junulo vekiĝis la sekvintan tagon kaj li longe pensadis, ĉu li tiel strange songis, aŭ ĉu efektive li vidis la fantomsenojn. Plej strange ŝajnis al li, ke la fantomoj postlasis nenian signon de sia hieraŭa ĉeesto. Li prenis la melkseĝeton kaj malsupreniris en la valon, kie la alpanoj gravmiene aŭskultis la aventuron de sia kunulo. Ili balancis la kapojn farante krucosignon. Sed de tiu tempo la knabo povis tiel bele jodli, ke la famo pri ĝi disvastiĝis en la tuta lando. La legendo rakontas, ke estis tre kortuŝe kiam li, starante sur alpo, aŭdigis la donacon de l' fantomsenoj.

Laŭ memoro rakontis
Ajnulo.

*) Seno alpa paŝtisto. **) Uri = svisa centra kantono.

Humoro.

Ekster komparo.

„Mia avo mortis naŭdek kvar jara."
„Mia avino mortis cent tri jara."
„Sed mi havas onklinon, kiu ankoraŭ ne mortis."

Ĉe pentristo.

„Kiom da tempo necesas, por pentri portreton?" juna sinjorino demandis pentriston.

„Tio dependas de la cirkonstancoj; se la afero estas pri belulino, tre longan tempon," respondis la pentristo.

Schiller.

Kiam li estis juna, la konata germana poeto Schiller lernis ludi harpon. Amiko diris al li:

„Vi ludas kiel David, sed ne tiel bone."

Schiller respondis:

„Vi parolas kiel Salomono, sed ne tiel saĝe."

Konsilo.

Filino: „Panjo, hodiaŭ mi malpaciĝis kun mia fianĉo. Diru, kiu el ni devas cedi?"

Patrino: „Ĝis la geedziĝo — vi, post la geedziĝo — li."

Katolikaro.

VIII-a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso 1923, Nürnberg.

Unua Komuniko.

„Ĝis revido en Nürnberg okaze de »Nia Oka«!" estis dirintaj la kongresanoj de la »Sepa« adiaŭigante sin en Nijmegen. La katolikaj Esperantistoj de Nürnberg unuiĝintaj en la »Katolika Esperanto-Grupo Nürnberg« sciiĝis kun granda ĝojo kaj entuziasmo, ke per tiu ĉi adiaŭa vorto estas elektita Nürnberg ankaŭ kiel kongresurbo por la »Oka«.

Jam post malmulte da tempo — la 12. okt. — kaplano Stahl, la prezidanto de la Katolika Esperanto-Grupo Nürnberg invitis la grupanojn kaj interesiĝantajn samreligianojn al ĉefkunveno, por fari la unuajn preparojn. Unu tagon antaŭe li estis ricevinta aŭdiencon ĉe Lia ĉefepiskopa Moŝto, D-ro Jakobo von Haŭck en Bamberg. Sekve de tio la prezidanto povis sciigi la multnombre kunvenintojn — ankaŭ Lia pastra Moŝto, Ekl. Kons. urbparoĥestro Thomann partoprenis je la unua preparkunveno kvazaŭ kiel reprezentanto de la Nürnberga sacerdotaro, ke »Nia Oka« havos la benon eklezian. Raportanto estis la meritplena fondinto de la Katolika Esperanto-Grupo Nürnberg, s-o D-ro Hotzeld, Strullendorf-Bamberg.

»Nia Tradicio«, tio estis la moto de lia belega parolado. »Kiel estis ĉe la antaŭaj kongresoj, tiel estiĝu ankaŭ ĉe la VIII-a kongreso en Nürnberg.« Post la referato oni komencis fari la planon.

Kiel templimo estis difinita sub rezervo de konsento de IKUE 28. jul. (sabato) ĝis la 2. aŭg. (ĵaŭdo), car la XV-a Universala Esperanto-Kongreso okazos ja de la 2. ĝis 8. aŭg. Sub la sama rezervo starigis la Nürnberga katolika Esperantistaro la Lokan Kongresan Komitaton:

1. S-o D-ro W. Hotzelt, Strullendorf-Bamberg, prezidanto,
2. S-o kaplano J. Stahl, Nürnberg, 1-a vicprezidanto,
3. S-o profesoro D-ro Ledermann, Nürnberg, 2-a vicprezidanto,
4. S-o oficisto J. Ehard, ĝenerala sekretario,
5. S-o fabrikanto A. Beilein, kasisto,
6. S-o K. Keuling (akceptejo),
7. S-o komercisto Schramm (loĝigo),
8. F-ino Ida Mezger (plezurajoj),
9. S-o redaktoro Bott (gazetaro).

Nürnberg kun sia granda katolika estinteco kaj sia novfloranta estanteco estos nun preparata, por ke tiu ĉi fama urbo malfermu siajn gastemajn murojn al la multaj centoj da katolikaj Esperantistoj de la tuta mondo.

Sed la Nürnbergaj katolikaj Esperantistoj povos ne solaj plenumi la grandegan verkon pri »Nia Oka«. Ili bezonas urĝe la apogon kaj subtenon de la tuta Katolika Mondesperantistaro.

Pro tio, karaj samreligianoj, la subskribinto vokas vin ĉiujn korege petante al la kunlaboro. Bonvolu helpi nin Nürnberganojn per la baldaŭa aliĝo, por ke ni povu certigi la budĝeton; bonvolu nin subteni per iniciatoj kaj proponoj, por ke fariĝu »Nia Oka« triumfo por nia sankta kredo kaj por nia kara lingvo Esperanto. Leterkaj telegramadreso: Internacia Katolika Esperanto-Kongreso Nürnberg.

Johannes Stahl,
prezidanto de la Katolika Esperanto-Grupo Nürnberg.

Federacio de Esperantistaj Societoj de Polujo.

III. Komuniko.

1. Laŭ la statuto de la Federacio (§§ pri Lokaj Federaciaj Komitatoj) en ĉiu urbo, kie ekzistas pli ol unu societo, funkcios Loka Komitato de la Federacio, konsistanta el reprezentantoj de ĉiu societo en egala nombro. — Teknike la fondiĝo de Loka Federacia Komitato prezentiĝas jene: reprezentantoj de ĉiuj lokaj societoj kunvenas kun pretaj listoj de bezonataj kandidatoj de iliaj societoj (en triobla nombro). La ĉeestantoj fiksas per reciproka interkonsento la definitivan liston de la lokaj komitatanoj. — La interna regularo de la L. F. K. estas dissendota baldaŭ.

2. Konsiderante la gravecon de la poresperanta agordiĝo de la gazetaro, kiel unu el la plej potencaj propagandiloj kontraŭ la indiferenteco kaj malĝustaj sciigoj pri Esperanto, la Federacio turnas sin al tuta pola Esperantistaro kun insista alvoko: la gravaj okazintaĵoj dum la lasta kunsido de la Ligo de Nacioj metas en la manojn de l' Esperantistaro fortan armilon por havigi al Esperanto baldaŭan definitivan venkon kaj triumfon. — Sed por ties efektivigo estas necesa vigla kaj senĉesa kunlaborado de ĉiuj Esperantistoj. —

Ĉiu pola samideano konsideru tial sia morala devo intensive propagandi inter la jurnalistaro de sia urbo kaj laŭpove aperigadi propagandajn artikolojn, sciigojn pri la movado ktp.

Personoj, kiuj prenas sur sin la taskon okupiĝi pri la gazetaro, bonvolu sendi sian detalan adreson al la sekretariejo de la Federacio (Dr. P. Muszkatblat, Warszawa, Krochmalna 15), por ke la Federacio povu esti kun ili en kontakto kaj interŝanĝi gazetajn artikolojn.

3. Responde je la memorialo, verkita de l' estraro Dr. A. Czubryński kaj sendita al la pola delegacio ĉe la Ligo de Nacioj (Delegation Polonaise auprès de la Société des Nations), alvenis letero de l' estro de la delegacio, s-o Sokal, priskribanta la sintenadon de la pola delegacio dum la debato pri Esperanto en la V. Komisiono kaj kun promeso pri plua laŭpova helpo, precipe koncerne la penetron de Esperanto en la oficialajn sferojn.

Varsovio, en oktobro 1922.

Dr. Paulina Muszkatblat,
ĝenerala sekretariino.

La Varsoviaj estraranoj estas feliĉaj kaj fieraj povi komuniki al la tuta poluja Esperantistaro pri la donaco de 50 (kvindek) mil polaj markoj, farita al la Federacio de ĝia prezidanto, s-o prof. D-ro Odo Bujwid.

La Varsoviaj estraranoj konsideras, ke estas ilia plej agrabla kaj honora rajto kaj devo, se ili esprimos en la nomo de la tuta Federacia estraro kaj ĉiuj polujaj samideanoj al ilia altestimata kaj amata prezidanto, kolonelo prof. D-ro Odo Bujwid sinceran dankemon por lia nobla faro kaj malavara donaco.

La Varsoviaj estraranoj.

Avertoj.

„Averto" en senco de admono estas ĉiam malagrabla afero. Neniu ŝatas esti admonata persone, tiom malpli publike. Pro tio la ĉefredaktoro de ET ĝis nun rifuzis presigi publikajn admonojn de samideanoj kontraŭ samideanoj, se li ne povis havigi al si nepre fidindajn argumentojn pri ilia justeco.

Bedaŭrinde dum kelksemajna vojaĝo de la ĉefredaktoro lia anstataŭanto akceptis pagitan anonceton, per kiu s-o Iv. H. Krestanoff en Dresden admonas s-on P. Kolev en Sofia pagi por antaŭ unu jaro liveritaj poŝtmarkoj. S-o Kolev nun skribis al ni, ke s-o Kr. donis al li dum printempo ses bulgarajn poŝtmarkojn (je valoro de 192 levoj) por ilin vendi k o n s i g n a c i e al alilandaj konatoj, tiel ke la mono estu pagota al s-o Kr. nur kiam s-o K. mem ricevis la pagon. Sed ĉar s-o K. ankoraŭ ne ricevis la pagon, do li ankaŭ ne pagis ĝis nun al s-o Kr.

Ni opinias, ke la tuta bagatelo ne valoras tiom da presinko, sed ni volas esti justaj al ĉiu. Ni scias, ke s-o Kr. vivas en malamikeco kun multaj el siaj samlandanoj. Tiom pli ni deziras resti neŭtralaj en tiu afero, ĉar ni ne povas nek deziras kontroli la kaŭzojn de tiu malamikeco. Ni nur bedaŭras, ke altmeritaj samideanoj devigas nin publike priparoli tiajn negoĵigajn tute personajn aferojn. Eventualajn pluajn artikolojn pri tiu afero ni nepre rifuzos.

Literaturaj Manuskriptoj.

Ricevitaj:

240. Enigmoj por infanoj. 241. Alte kaj malalte (Lemański). 242. Du poemoj en prozo (Fr. S.) 243. Sonatino (Dario). 244. Kikibjo (Orengo). 245. Mevino (Ves. Dem.). 246. La ŝtonoj (Parsons). 247. Nimfo kaj kaprico (M.K.). 248. Terurajoj (M.K.). 249. Al virino (M.K.). 250. Endormiĝanta horo (M.K.). 251. Ritmaj siluetoj (M.K.). 252. Esperanto kaj la policanaro (Mallerta). 253. Kiam oni perdas sian pantalonon (Mallerta).

Ni petas la gesamideanojn, kiuj sendas al ni literaturajn manuskriptojn, daŭre atenti ĉi tiun rubrikon, kiun ni aperigos en ĉiu numero.

Mallongaj Sciigoj.

En Cassel (Germanio)

la laborista grupo komencis novan kurson kun 60 partoprenantoj kaj fondis grupon en Hann.-Münden, kie komenciĝis kurso kun 60 gelernantoj. En Cassel la Idistoj en 1923 volas aranĝi kongreson kaj jam nun vigle laboras. La Esp. grupo havas multan okazon ekspozicii kaj urĝe petas pri sendo de ekspoziciindaj Esperantaĵoj al s-o Fr. Deiters, Cassel, Schillerstrasse 29, Germanio.

Subvencion de 250 liroj donis la urbestraro

en Voghera (Pavia), Italio, al la tiea Esp. grupo. La provincestra konsisario afable permesis kiel en la pasinta jaro Esp. instruadon en lerneja ĉambro. La estraro de la grupo en Voghera estas jena: prez. f-ino E. Claretto, kasisto s-o A. Colombo, sekretario s-o G. Zuarone.

Esperanto en Dalmatio.

La movado bone progresas en ĉi tiuj sudslavaj regionoj. En Split la loka grupo malfermis komence de oktobro novajn kursojn kun 100 partoprenantoj. La ekspozicio elmontrita en la urba centro havis plej bonan sukceson. La grupo fervore laboras por interesigi la cirkaŭajn lokojn pri Esperanto kaj jam bone sukcesis en Sinj kaj Omis, kie nia movado akiras nun novajn fortojn. Plej granda estas la propragando inter la poŝtistoj, al kiuj oni dissendis cirkulerojn; ĝis nun lernas Esperanton poŝtistoj en 25 diversaj lokoj. La „Esp. Klubo" en Split preparas novan ekspozicion kaj kore petas pri alsendo de ĉiuspecaj libroj, gazetoj, afiŝoj, reklamiloj ktp. Ĝi ankaŭ petas konsiloĵn pri trafa kaj sukcesa propagando, varbado, instruado, societaj ludoj ktp. Adreso: s-o Rupčić, Palmin 9, Split, (prez. de Esperanta Klubo en Split).

Parolado al Budapestaj profesoroj.

La 27. okt. prof. König faris interesan paroladon al Budapestaj profesoroj pri la rezultatoj kaj protokoloj de la ĝeneva konferenco pri Esp. instruado. Bedaŭrinde pro ekonomiaj cirkonstancoj nur malmultaj profesoroj ĉeestis. Gazeto „Vilag" sendis raportanton kaj aperigis bonan sciigon pri la parolado.

En Budapest fondiĝis studenta grupo de universitatanoj.

„Esperanto Triumfonta" Virina Katolika Esperanta Grupo

fondiĝis en Moncalieri, urbeto apud Torino (Italujo). En la sama loko fondiĝis Katolika Esp. Rondo „Modesto Carolfi" (prezidanto de italaj katolikaj Esperantistoj).

Esperanto en Varsovio.

S-o Józef Litauer, subprokuroro de Varsovia Tribunalo, propagandas Esperanton en la klubejo de Varsovia Y. M. C. A., kiu kalkulas preskaŭ 6000 membrojn. La 11. okt. s-o Litauer prelegis pri la Unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer kaj pri Esperanto kaj idealoj de Y. M. C. A. Ĉeestis pli ol 150 junaj aŭskultantoj. Okazos pluaj prelegoj pri aliaj Esp. temoj.

Esperanto en Riga.

Dum la plena kunveno de Riga Esperanta Societo 5. 11. 22 estis inaŭgurita ĝia nova standardo. Ĝin transdonis al la societo la plej malnova Esperantisto de Latvio, prof. P. Kadikis, farante ĉarman paroladon pri la signifo de la verda koloro de la standardo kaj ĝia blanka kvarangulo. La prezidanto de la societo dankante lin pro la parolado eldiris la esperon, ke Esperanto rapide disvastiĝos ankaŭ en la provinco kaj baldaŭ la verda standardo ekflirtos en la tuta Latvio.

La laboristaj kabaredoj.

La 22. okt. estis en la centra kunvenejo de la Hungarlanda Laborista Esp. Soc. granda kabaredvespero aranĝita per la laborista Esp. kantista koro. Ĝi, kiel preskaŭ ĉiuj similaj aranĝoj de la laboristaj grupoj budapestaj bonege sukcesis: ĉeestis proksimume 600 personoj. Similaj festoj okazas preskaŭ ĉiusemajne en unu el la 9 laboristaj grupoj de Budapest, kaj la programenhavo ne estas laŭ Esp. vidpunkto tro menciinda, ĉar krom kelkaj paroloj, deklamadoj kaj krom la bonega kantistaro laborista la aliaj programpunktoj estas hungaraj diletantaĵoj. Sed ja por granda parto de la publiko la ĉefafero estas la dancado sekvanta. Tamen tre utilaj estas tiuj festenoj, ĉar ili tamen efike propagandas en certaj rondoj kaj la enspezoj estas ĉiam grandegaj. Ni esperas daŭrigon de tiu metodo. Precipe bonega estas, ke ili okazos en ejoj, kien ĉiusemajne multaj geamuzemuloj kutimas iri, kiu ajn aranĝas ion, do la publiko estas ĉiam amase certigata! Jen imitinda ekzemplo!

La budapesta sukceso de Literatura Mondo.

Ĉiuj budapestaj gazetoj raportis pri apero de la Literatura Mondo tute serioze, bonvole kaj la Pester Lloyd eĉ tute detale. La gazeto faris inter la neesperantistaj rondoj tre bonan impreson.

En Szombathely (Hungario)

s-o M a r i c h el Budapest, eldonisto kaj redaktoro de la sukcesa „Policisto" faris grandan paroladon en la Kulturpalaco pri Esp. Komenciĝis 3 kursoj.

Ĉeĥoslovakio.

La »Esperanto Propaganda Zentrale für Ostböhmen in Trautenau« aranĝis fine sept. propagandan paroladon en Pilnikau ĉe Trautenau (parolanto s-o Otto Schmidt el Trautenau) kun tre bona sukceso. Nuntempe okazas en tiu ĉi urbeto du kursoj kun 60 partoprenantoj. — Propaganda parolado de s-o Otto Schmidt el Trautenau okazis 5. nov. en Freiheit ĉe Trautenau por la urboj Freiheit, Marschendorf kaj Johannisbad. — En Trautenau, 11. nov., okazos propaganda parolado de s-o ing. prof. Gustav Scholze el Reichenberg.

„Rondeto de Esperantistinoj" en Praha

aranĝis 3. okt. publikan paroladon de sia prez. f-ino J. Šupichová pri la temo: „Kion devas scii ĉiu ĉeĥo pri Esperanto". Ĉeestis pli ol 150 personoj. „Rondeto de Esperantistinoj" malfermis 3 kursojn: preparan kurson por ŝtata ekzameno gvidata de s-o H. K. Bouška kaj f-ino Šupichová, kurson por progresintoj de f-ino Šupichová, kurson por komencantoj de f-ino L. Dandová.

Al malsatantaj rusaj Esperantistoj sendis „Rondeto de Esperantistinoj" per American Relief Administration la profiton el li. „Esp. Rondo" kč. 500.—

Bildoj el Finnlando

kun Esp. teksto aperis en plej disvastigita ĉeĥoslovaka ilustrita revuo Český Svět. La luksa kajero enhavas du pagojn kun belaj ilustraĵoj el la lando de nia XIV-a. Estas aldonitaj Esp. surskriboj kaj artikoleto. Por helpi ĉi tiun Esperantigan laboron de la ĉeĥoslovakaj samideanoj, mendu senprokraste la koncernan kvaran numeron de Č. S. skribante en Esperanto al la administracio de Český Svět, Praha, Ĉeĥoslovakio. La kajero kostas afrankite 5 kč., en Ĉeĥoslovakio 3.50 kč.

De S-o J. Gili Norta el Barcelona,

kuneldonanto de ET, kiu nuntempe faras komercan vojaĝon tra diversaj sudamerikaj landoj, ni jam ricevis kelkajn belajn vidaĵkartojn kun salutoj; la lasta karto, forsendita la 22. sept. el Parto, urbo situanta en Kolumbio, 2800 metrojn super la marnivelo en la koro de la Andoj, atingis nin antaŭ kelkaj tagoj. Ne posedante amerikan adreson de nia semideano-amiko, ni petas lin, se hazarde tiu ĉi numero venos en lian manon, ke li bonvolu akcepti nian plej bonan dankon pro liaj salutoj kaj reciproke niajn korajn salutojn.

Por Esperanta Ligilo

ni ricevis donacon n-o 234, de Fernando Zacché en Mantova 2 lirojn; 35 gmk. de s-o W. D. Ralph, London.

Geblinduloj

aŭ ties amikoj, kiuj deziras akiri Evangelion de S-ta Johano en Esperanto kaj Braille, sin turnu al Cosmo Ricca, strato Giov. Tomm. Invrea n-o 2, int. 5, Genova, Italio.

Parolejo.

136. Rondirontaj.

Kial, ĉiufoje kiam aperas interesa propagandartikolo, ne sendi ekzempleron de la ĝin enhavanta gazeto al unu aŭ kelkaj gesamideanoj, metante grandan R sur la banderolo?

Ĉiu ĉefiltero de la vorto „Rondironta" estus peto al la ricevonto, por ke li siavice sendu la gazeton post kiam li estus ĝin leginta, ankaŭ metante sur la banderolo grandan R.

Tiel fariĝus utila propagando, kiu elspezigus tre malmulte de ĉiu.

Bonega rimedo por tutligi tiun propagandon estus kopii, mane aŭ skribmaŝine la artikolon kaj klopodi por ĝin enpresigi en la regionaj gazetoj.

Gesamideanoj, ĉiam antaŭen por Esperanto!

L. Demarcy.

137. Ne nur literaturo!

Japana ingeniero, kiun mi alparolis kun varbaj celoj, diris al mi, ke volonte li mem kaj kredeble multaj Orientanoj studus Esperanton, se ili povus per ĝi eviti la studon de aliaj Eŭropaj lingvoj: t. e. se ili trovus librojn Esperante verkitajn pri tekniko, historio, filozofio, ktp.

Ĉu, prefere ol eldoni novajn kolektojn de literaturaĵoj, la Esperantaj verkistoj kaj eldonistoj ne trovos dezirindaj tiajn verkojn?

Esperanto ricevus fortan antaŭenpuŝon, se ĝi iam povus montri kolekton similan je la germanaj de Göschen (Sammlung Göschen), Teubner (Aus Natur u. Geisteswelt), Quelle u. Meyer (Wissenschaft u. Bildung), je la angla de Williams & Norgate (Home University Library), je la franca de Flammarion (Bibliothèque de Culture Générale) kaj Payot (Collection Payot), je la itala de Hoepli (Manuali Hoepli).

Ĉu la admirinda agemo de s-o Jung ne ŝatus tian vojon?

D-ro *B. Migliorini*, Roma.

Recenzejo.

LIBROJ.

LA PLEJ BELAJ VIDINDAĴOJ DE FRANCUJO. Sub tiu ĉi titolo aperas belartaj albumoj, lukse eldonitaj sur bristola papero kaj reprezentantaj la plej agrablajn rememorojn pri Francujo. Teksto en lingvoj franca, angla, hispana kaj Esperanta. Esp. traduko de E. Archdeacon. Ĉiu albumo enhavas 48 belegajn heliogravurojn. La prezo estas 40 franc. fk. kun kartona kovrilo, 50 fk. kun tola kovrilo kaj 60 fk. kun leda kovrilo. Por sendkostoj aldonu 10%. Antaŭa pago. Eldonejo: Editions d'art L.-J. Patras, 72 rue Vasco-de-Gama, Paris 15 e.

Ĝis nun aperis du albumoj: 1. Paris kaj 2. Versailles, St. Germain-en-Laye kaj Malmaison. Sendube, la albumoj apartenas al la plej luksa kaj bela, kio ĝis nun aperis en Esp. lingvo. En tiu rilato ili estas kompareblaj kun la artverkoj „Albrecht Dürer" kaj la „Transmara Revuo de Čsl. Legioj el Siberio". Ĉiu samideano, kiu povas senigi sin de 40—60 francaj frankoj, volonte faros tion por posedi en sia biblioteko tiel belegajn artaĵojn. La Esp. traduko estas sufiĉe bona, kvankam troviĝas en ĝi kelkaj malfacile komprenebla esprimoj, malkorektaĵoj kaj preseraroj, kiuj estos forigeblaj en dua eldono. *(T.J.)*

NUNTEMPAJ RAKONTOJ. De G. P. Stamatov. Tradukis Iv. H. Krestanoff. 80 pĝ. karton. La aktualan prezon demandu de la eldonejo Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig.

Tiu ĉi plaĉe aranĝita libreto el la „Internacia Mondliteraturo" enhavas kolekton de kvin modernaj kaj pro ilia satira, parte eĉ sarkasma karaktero speciale rimarkindaj rakontoj de konata bulgara verkisto. La stilo — generale bona kaj flua — estas kelkaloke malfacile komprenebla. Mi konsilas ne uzi perfekton, kie sufiĉas imperfekto. Anstataŭ „honti de", „kontenta de" mi preferas „pro"; anstataŭ „iri returnen, pluen" „returne, plue"; anstataŭ „tiame" simple „tiam". La tradukinto tro ofte uzas „pasi" anst. „iri". Kelkfoje mankas pronomo (ĉu „bulgarismo"?) aŭ staras nominativo anst. akuzativo. Tamen la ripr. ĉindajoj ne difektas la ĝuon, kiun havas ĉiu ŝatanto de moderna literaturo, leganto la libreton. Cetere, la kolekto estas rekomendita de Esp. Lit. Asocio. *(T. J.)*

KOREKTO DE LA ERARAJ TRADUKOJ EN „UNIVERSALA VORTARO" (kun aprobo de la Lingva Komitato), de Th. Cart, angla parto. 8 pagoj, prezo 3 d. Ricevebla ĉe The British Esperanto Association, 17 Hart Street, London W. C. 1.

GAZETOJ.

France-Esperanto, nov.
Bulletin de la Société Française pour la propagation de l'Esperanto, nov.
Pola Esperantisto, nov.
Bizantio, sept.-okt.
La Suda Kruco, n-o 26-27.
Holanda Esperantisto, 2., 9. nov.
La Verda Ombro, sept.
Informa Bulteno de la „Barcelona Esperanta Societo".
Esperanta Finnlando, n-o 8-9, kun tre interesa raporto pri la XIV-a kun multaj ilustraĵoj.
Germana Esperantisto, nov.
Sennacieca Revuo, nov., kun tre interesa artikolo „Tri Semajnoj en Rusujo", personaj impresoj de s-o E. Lanty.
Der Arbeiter-Esperantist, nov.
Novaj Tempoj, nov.
Amerika Esperantisto, okt.
La Revuo Orienta, sept.
La Espero, okt.

Leterkesto de ET.

H. L. en Waldshut. — Abonoj por okt. ĝis dec. povas ankoraŭ esti faritaj ĉe la poŝtoficejoj por la prezo de 100 mk. po monato.

W. K. en Radom. — Ne malpaciencigu! Revuo venos unuafoje kun n-o 112.

Esp. Kl. en Spl. — Se ni preasus por ĉiu grupo alvokon en amplekso de via, ET devus esti 64-paĝa.

M. B. en A.-s.-B. — Alian fojon bonvolu sendi legeblan manuskripton, se vi ne volas vidi erarplenan anoncon.

O. G. en Praha. — Manuskripto pri antaŭkongreso en via urbo ĝis nun ne alvenis.

V. Č. en Nuale. — N-o 104 estas regule sendita, sed ne plu liverebla, ĉar elĉerpita.

M. K. en T. M. — Via artikolo pri tekniko de Esp. poezio interesos nin. Via abono daŭros ĝis 115.

A. S. en Helsinki. — Volonte ni represus vian bildon Sed pro trea plialtiĝo de prezoj por klišoj ni povas tion nur escepte fari, ekz. se sendantoj pagas parton de la kostoj. Kun danko ni enigas la foton en nian albumon. Cetere, kion signifas „settlemento"?

Ch. Th. en K. — Ni ĝojas, ke vi komprenis la necesecon de prezaltigo por germanoj. Tamen via opinio, ke ni ne povas ĉesigi liveradon al nepagintoj, estas malĝusta, kvankam vi estas fakulo. La poŝtoficejoj donas la nomojn de la abonintoj. Ce'cere preskaŭ ĉiuj kr mpagis.

Germana Esperanto Komerca Korporacio (Berlin-Steglitz, Germanlando).

Al Kristnaska festo ni rekomendas la bonkvalitan

„Esperanto-Parfumo“

(Moreau-Paris)

Skatolo kun 12 flakoneto]: 5 fr. fk., 0,50 dol., 2 šil., 1 sved. kr., 2 svis. fk., 1 hol. guld., 1.50 dan. kr, 2 peset, 10 č. kr., en letero. Pogrande rabaton de 10%. Al demando aldonu respondkuponon.

BALDAU APEROS:

„PRETER LA VIVO“

POEMARO DE

JULIO BAGHY.

SUR BONA PAPERO, EN LUKSA VESTO, APEROS 80 ORIG. POEMOJ DE LA POETO KUN LIA PORTRETO KAJ ANTAUPAROLO DE K. DE KALOCSAY. (100—120 PAĜOJ.) LA EKZEMPLEROJ ESTOS NUMERITAJ KAJ HAVOS PROPRAMANAN SUBSKRIBON DE LA AUTORO.

★

ABONPREZOJ:

POR ORDINARA ELDONO . . . . . 1 SV. FK.
POR LUKSA ELDONO KUN PORTRETO . . 2 SV. FK.

MENDU ANTAU APERO, ĈAR POST APERO LA PREZO PLIALTIĜOS! SENDU LA MONON EN NACIAJ BANKBILETOJ AL ADRESO: „LITERATURA MONDO“, BUDAPEST VI, ANDRASSY UTCA 81. II, 1 SZ.

LA
PLEJ BELA DONACO POR
KRISTFESTO ESTAS
GRAMOFONO!
LIVERADO DE ĈIUJ SISTEMOJ PER
ESPERANTO KOMERCISTA GRUPO,
DRESDEN-N, HAUPTSTRASSE 38.

★

La Steloj

anoncas vian sorton!

Mi scligas al vi vian horoskopon bazantan sur nepre scienca bazo. Ĝi estos al vi en ĉiuj animaj kaj materiaj vivdemandoj certa konsilanto kaj helpanto. Preciza matematika kompilo, detala kaj individua aŭguro, apliko de plej novaj psikologiaj helpiloj. — Oni scligu al mi la lokon, jaron tagon kaj horon de naskiĝo; skribspecimeno (eventuale bildo) dezirata. — Horoskopo germanajn markojn 3000.—

Freifrau Irene v. Veldegg, Niederlössnitz (bei Dresden), Lindenaustrasse 9, Germanujo.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.40 jeno, 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 2 esk., 5 lir., 6 kč., 7 fmk., 10 din., 18 lejoj, 18 levoj, 400 gmk., 200 hung. kr., 1000 pmk., 5000 aŭstr. kr. Ĉiu povas pagi per lu ajn el la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncantoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikiĝo. — Aŭstrajn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polajn de 100 mk. aŭ pli.

En specialaj aŭ ekstervical numeroj specialaj prezoj.

MIA AMIKO, belegaj legaĵoj de Zamenhof, Burlet, Ramstedt, Bein, Šigemacu, Abdul Baha, Rabindranat Tagore, Gogol k. a. kolektitaj de Hitrov, 1 ekz. 0.50 franc. fk. Por Rusoj jam aperis plena lernolibro: gramatiko, ekzercaro, frazaro, legolibro k. du Esp.-rus. kaj rus.-Esp. vortaroj. Poŝte 120 germ. markoj, altvalutaj landoj 100%. Sendas P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18. La sama lernolibro en preparo por Bulgaroj!

PRO MALSANO Francisco Sanz ne povas korespondi pri poŝtmarkinterŝanĝo. Amiko lia respondos ricevitajn leterojn.

REPRODUKCIOJN de popolaj kaj naciaj kostumoj (sur vidajkartoj, bildoj, desegnaĵoj ktp.) serĉas por lernejaj celoj prof. ing. Frant. Říha, direktoro de la Industria Lernejo en Vieno III. (Aŭstrio), Schützengasse 31. Reciproke sendos bildojn de kostumoj aŭstraj aŭ ĉehoslovakaj.

ĈIULANDAJ MODELISTOJ, metalistoj, kaj instruistoj de mana farado de industrio arba, dezirantaj korespondi pri metiistaj aferoj, skribu al B. Czechowski, Warszawa-Rembertów, „Pocisk“ (Polio).

NORDAJ GESAMIDEANOJ! Du junaj germanaj instruistoj intencas vojaĝi tra Danujo, Norvegujo, Svedujo, Finnlando, Rusio, Polujo proksiman printempon. Kiu afable gastigus ilin por kelkaj tagoj? Ni volonte rekompencos per ia laboro. Ni tre petas sciigojn pri laboreblecoj. Ĉiu laboro volonte akceptota. Skribu al: s-o Hermann Petermann, Schwerte (Ruhr) Westf. Germ., Hagenerstr. 6.

EKKRIO. Juna 22-jara ftizulo, akademia skulptur- kaj pentristo petas usonan samideanon pruntedoni kiel pruntaĵon aŭ hipotekon 20 dol. (č. 100 000 gmk.) por ebligi 6-monatan restadon en resanejo. Mi inklinas al ĉia ekvivalento; okaze de pluraj proponoj mi sciigos.

Ofertojn sub „Ekkrio“ bonvolu direkti al la redakcio de „Esp. Triumf.“ en Horrem-Köln.

Ĉiu kolektema kaj korespondema Esperantisto, iĝos membro de la:

„PORKORESPONDA KAJ PORINTERŜANĜA SOCIETO INTERNACIA“

„BATAVO“

Aliĝu tuj! SCHEVENINGEN — HOLANDO Aliĝu tuj!

kiu eldonas interesan trimonatan oficialan organon, nomatan:

„Orange-Poste“

redaktitan en tri lingvoj (Esperanto, franca kaj germana lingvoj), belege ilustritan kaj prilaboritan.

Ĉefgvidanto: S-o Bernard Boon, vicdel. UEA en Scheveningen. — Multaj kunlaborantoj, i. a. s-oj Paŭlo Balkányi, Budapesto, ĉefdel. UEA, kaj Jan Fethke, kunred. de ET. — Poŝta adreso: Int. Societo Batavo, Scheveningen, Holando.

Kotizoj kaj anoncprezoj.

		1 jaro	1 pg.	1/2 pg.	1/4 pg.	1/8 pg.	anoncet. po vorto
Belgio, Francio kaj Kolonioj	Fk.	7.—	35.—	20.—	12.—	7.—	0.15
Brita Empiro kaj Kolonioj	Šil.	2.—	10.—	6.—	3/6	2.—	1/sd.
Bulgario		30.—	150.—	90.—	50.—	30.—	1.—
Romanio Le(v)oj:							
Skandinavio: Kr.							
Svisujo: Sv. Fk.		2.—	10.—	6.—	3½	2.—	0.05
Portugallo: Esk.							

Kotizoj kaj anoncprezoj.

		1 jaro	1 pg.	1/2 p.	1/4 p.	1/8 p.	anoncet. po vorto
Finnlando:	Fmk.	20.—	100.—	60.—	35.—	20.—	0 50
Jugoslavio:	Din.						
Italio:	Liroj	10.—	50.—	30.—	20.—	10.—	0.20
Holando:	Gld.	1.—	5.—	3.—	2.—	1.—	0-02
Japanujo:	Jen.						
Hispanio:	Pes.	4.—	20.—	12.—	7.—	4.—	0.10
Usono:	Dolar.	0.50	2.50	1 50	1.—	0.50	0.01

Germanio, Aŭstrio, Hungarlando, Baltikaj Ŝtatoj, Pollando, Rusio pagas ĝis decembro por 1 jaro: gmk. 250.—, por anoncoj: 1 pĝ. gmk. 1250.—, 1/2 pĝ. gmk. 750.—, 1/4 pĝ. gmk. 450.—, 1/8 pĝ. 250 —, por anoncetoj (po vorto): gmk. 5.— Anoncetoj ne devas enhavi pli ol 25 vortojn.

Specimenaj gazetoj haveblaj ĉe s-o Hans Wolf po gmk. 40.— — Senkostaj informoj pri abonprezoj post decembro ĉe s-o Hans Wolf, Hahnstr. 60, Stuttgart, Germ. — Aliĝojn kaj monon oni sendu al la Direkcio en Scheveningen, prefere per poŝtmandato, ĉeko aŭ letero rekomendita. — Ĉiu, kiu aliĝos, rajtas enmeti senpagan unuan anonceton de dekkvin vortoj post siaj nomo kaj adreso en la membrolisto. — Ĉiu, kiu varbos novan anon, ricevos plilongigon de trimonata abono. — Ekstereŭropaj delegitoj ankoraŭ serĉataj, demandu informojn pri tio. — Ĉiu gazeto Esperantista, postanoncanta ĉi-supran anoncon, rajtas enmeti samspacan en la „Orange-Poste“ (± 1/2 pago).

LA TRIUMFO DE ESPERANTO

Gramatika Praktiko

Flandra kaj franca, de L. Varendonck

Prezo: 3 15 fk. enlande
3 50 fk. eksterlande
Rabato ĉe granda mendo.

Eldonis:
„La Tagiĝo“, Posthornstr. 14, Ledeberg (Belg.)

Interesajn artikolojn

bonajn, ne tro longajn, kiuj koncernas nian movadon kaj aferojn de ĝenerala intereso

ni nun bezonas por ET!

Ni atentigas la legantaron, ke

LA SENLINGVULO

estas

elĉerpita

Pri novaj, baldaŭ elirontaj verkoj informos niaj anoncoj.

Butin & Jung, Godesberg, Germani.

Poŝtĉeka konto Köln 92036.

Nederlanda Anonima Societo

Luksa-pano Fabrikoj

antaŭe **Henri J. Carels.**

50 Butikoj:

Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

(Ĉefo: H.A. Scharwächter)

63 Weimarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

Tradukintoj de bulgaraj literaturaĵoj

publicitaj en Esp. gazetaro bulgara kaj fremdlanda estas petataj indiki titolon, aŭtoron, gazeton, sian nomon, por prepari **nomaron** de la ĝis nun Esperantigitaj rakontoj kaj versaĵoj el la bulgara literaturo aldonotan al aperonta **Bulgara Antologio** kaj por eviti duoblan laboron.

Iv. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden-A, Germ.

Al interesantoj pri „Rokaro de Praĥov“!

Kiel ni skribis, gvidlibreto tra Rokaro aperos nur, se ni trovos ducent antaŭmendoin. Prezo por la libreto pli ol 30 paĝa 2 kč Ankaŭ skribu ĉu vi preferas antaŭ- aŭ postkongresan viziton de „Bohema Paradizo“. Antaŭmendoj jam nun akceptotaj! Dum la XV-a lumbilda parolado pri „Bohema Paradizo“. Adresu ĉion (por respondo aldonu resp.-kup.) al: A. Vagner, ĉe s-o Hlaváček, Jičín, ĉefplaco, Ĉehoslovakio. — 10 bildoj el Rokaro de Praĥov kun Esperanta teksto 6 ĉehajn kronojn.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28420
Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Hr. Gaševski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉehoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuigo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latva: Talivaldo Indra, Riga, Pasta kaste 475.
Litova: Paŭlo v. Medem, Šmellu g-ve 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravesteijn jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝtĉeka konto Haag n-o 2578.)
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkesto n-o 630.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
Svisa: Esp. Librejo „Verda Stelo, Rosenheimerstr. 5, St. Gallen-Ost.
U. Š. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

En Preparo:

D-ro Edmond Privat:

Vivo de Zamenhof

(Speciala eldono por mez- k. malbonvalutaj landoj)

Historio de la lingvo Esperanto

Salom-Aleĥem. Perec:

Hebreaj rakontoj

El la hebrea originalo trad. *Is. Mučnik*

(Internacia mondliteraturo vol. 9)

Eugen Wüster:

Teknika vortaro

Esperanta-Germana, Germana-Esperanta

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig.

Konkurso de „Literatura Mondo“

por junaj Esperantistoj pri la temo:

„Kio impresis min plej profunde en mia vivo?“

Premio en valoro de 50 svisaj frankoj.

Detalajn kondiĉojn sendas

Literatura Mondo, Budapest IV, Andrássy ut. 81, Hungarl.

Mi serĉas komercajn interrilatojn kun

Eksportistoj de LIGNO en Finnlando

Em. Deckx, Wolfstraat 8, Antwerpen, Belgujo.

Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pol.

(Posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld.)

Bankkontoj:
Wiener Bank Verein, Wien I
Wohl & Cie, Danzig
Bank Małopolski } Jaslo
Bankdomo Kornfeld }

Poŝtĉekaj kontoj:
Leipzig n-o 89775
Praha n o 59354
Varsovio n-o 140 685
Zürich n-o 7 263

Ni liveras ĉiujn Esperantajn librojn. Al konstanta mendanto ni konsilas malgrandan de konto ĉe ni.

Inter aliaj ni rekomendas

el originaloj:

Belmont, Leo: Sonoj Esperantaj, bind.
Boucon, H.: Humoraĵoj
Elski kaj Eska: Unuaj agordoj
Grabowski, Antoni: Nova Antologio
Grenkamp, Salo: Krioj de l' koro
Šapiro, J.: Babiladoj de bonhumora Zamenhofano.

el tradukoj:

Balucki: Ama bileto, trad. Ender
Grabowski, A.: El parnaso de popoloj
Grenkamp, Salo: Penseroj
Kabe: Internacia Krestomatio
Mickiewicz, A.: Sinjoro Tadeo, trad. Grabowski
Orzeszko, E. A.: A.. B.. C., trad. Ender
Prus, Boleslaw: Pekoj de l' infaneco, tr. Grabowski
Przybyszewski, St.: La neĝo, trad. Ficovski

Por la ajn demando aldonu por respondo. Kontraŭ respondkupono ni forsendas nian prezaron. Pro rapidega senvaloriĝo de nia monvaloro — sekve plialtiĝo de prezoj — ni ne povas citi la prezojn.

AL MIAJ KLIENTOJ! Mi ricevis multajn konfesleterojn, sed, ŝparante elspezojn kaj tempon, mi estas devigata, danki tiamaniere. Grafologo Hans Chlubna, Wien V., Storkgasse 12, Aŭstrio.

„ESPERANTO“. Kiu abonanto ne konservanta daŭre la gazeton povus sendi la 3. (martan) numeron 1921 al f-ino B. Veselá, del. de UEA en Josefov 21., Ĉehoslovakio? Lu ajn kompenso.

KONTRAŬ 10 DOLAROJ aŭ 10 svisaj frankoj mi sendas kompletan serion da rumanaj kronada poŝtmarko, eldonita kun kronado de rumana reĝo. Adalberi Toader, Teiuš-gara, Rumanio.

Korespondo kaj interŝanĝo.

S-o Elio Migliorini, Piazza Scanderbeg 85, Roma 4 (Italio), interŝanĝas fotografaĵojn (nur 4½ : 6) korespondas kun Nürnberg'anoj kaj München'anoj, havigas kontraŭpage romajn poŝtkartojn, aĉetus Couturat-Leau, Histoire langue universelle.

S-o Hermann Zimmer, Brünn, Česka 9/III, Ĉehoslovakio (Moravio) deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. bfl. kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Kolektantoj! Kiu sendos al mi 3 fk. svis. en rekomendita letero, tiu ricevos tuj de mi 10 belegajn vidajkartojn de Praha. B. Paleček, Praha II-1446, Vyšehradská tč. 49, Ĉehoslovakio.

S-o C. van Doorne, De Vliegerstraat 28-b, Rotterdam, Holland, kolektas kaj interŝanĝas aforismojn (Esperanta, holanda, germana, angla, franca lingvo). Mencio de verkantoj ĉe la aforismoj necesa.

S-o Gys van Dyk, Tuinstraat 59, Wormerveer, Holando, estas amatorfotografanto, deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj (escepte Holando, Germanio, Aŭstrio, Hungarlando). Preferas Hispanion, Italion kaj ekstereŭropon. Li ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn kun ekstereŭropo.

S-o Alf. Sover, Nõmme, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. de ĉirkaŭaĵo, naciajn jurnalojn, moneretojn ktp

Sendu al mi neuzitajn poŝtmarkojn (sen stampilo) de via lando kaj vi ricevos poŝtmarkojn uzitajn kaj neuzitajn laŭdezire en la sama valoro. D-ro Arthur Heller, kuracisto en Schaĝlar (Ĉehoslovakujo)

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj (escepte Francujo) per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn. Maurice Bonnard, 16 Bd. Galliéni Aulnay sous Bois S. et O., Francujo.

S-o Garello Elio, Tiazza Carignano 14-5. Genova (Italio), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Henryk Lewandowski, Lwów (Polio), Uniwersytet, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj ĉiuteme, speciale pri politiko, pacifismo, popola movado, lingvoj. Interŝanĝas naciajn gazetojn.

S-o Andreo Felvinczy, Cluj, C lea Regina Maria 42 II (Rumanio), interŝanĝas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj

Du amikoj deziras korespondi letere kaj poŝtkarte kaj interŝanĝi papermonon kun ĉiulandanoj: Norbert De Schrijver, Molenstraat 135, kaj Florimond Noppe, Molenstraat 127, Lokeren (Belgujo).

S-o J. B. E. De Koster, M. H. Trompstraat 23 I, Amsterdam, Holando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., fotografaĵojn kaj fremdan monon.

Du amikoj: Friedrich Haack kaj Heinrich Heutmann ambaŭ en Gladbek i. W. (Germanujo), Landstr. 75., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo, interŝanĝas papermonon kaj Esperantaĵojn.

Du amikoj-junuloj deziras korespondi: Stefan N. Vardev kaj Teodor K. Popov en Petrič, Bulgario; la unua ĉiuteme kun junuloj tutmondaj, la dua precipe kun geskoltoj kaj gejunuloj el neeŭropaj landoj.

S-o Kiril Bojanov, s. Dol.-Doubnik, Plevensko, Bulgarujo, deziras korespondi kun gesamideanoj Esperante kaj bulgare. Interŝanĝas poŝtkartojn ilustr., Esp. gazetojn, leterojn kaj diversajn fotografaĵojn.

S-o J. Pasynkowski, Suprasiska 3, Białystok, Polujo, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun gesamideanoj de la tuta mondo ĉiuteme. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn kaj Esperantaĵojn.

Du amikoj deziras korespondi nur kun fraŭlinoj plejeble perfektaj en Esperanto el ĉiuj landoj, escepte Germanion: Otto Breuer, Grottau, Ĉehoslovakio (Gummifabrik), Emil Eisner, Grottau, Ĉehoslovakio (Gummifabrik).

S-o Rudolf Gotsche (28 jara) Trautenau, Ĉehoslovakio, deziras anglan kaj Esperantan korespondon kaj interŝanĝadon de ilustr. poŝtkartoj, prefere kun komercistoj.

Kiu sendos al mi ĝis 100 poŝtmarkoj, ricevos la saman kvanton da aliaj. Ankaŭ korespondas letere kaj per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), s-o Alois Weiss, Wien X., Bürgerplatz 16/32, Aŭstrujo.

S-o v. Coevorden, Amstelveensche weg 63, Amsterdam, Holando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de Holando kaj Holanda Hindujo kun aliaj landoj.

Filatelistoj! S-o Anfosso E., Via Montaldo 2 A/I, Genova 10 (Italio), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Aloÿs Roels, instruisto, Bergendries 28, Lokeren (Belgujo), deziras korespondi karte kaj letere kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

S-o Knut Jensie, Angsdal 2,
John Westergren, Västra Holmgatan 20,
Gustav Isberg, Västra Holmgatan 20,
Gerhard Wilsson, Andersens Frödgard,
ĉiuj en Jönköping, Svedio, deziras korespondi kun samideanoj en ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Bazilo Averin, 6 uč. 3 Bakalda, N-o 30, Astranan (Rusujo), deziras korespondi.

Konstanty Chmielewski, libristo, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a, volas interŝanĝi polajn poŝtmarkojn pogrande (de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur nedifektitajn.

S-oj Georges Foucher, 39 Bis., Rue Danton,
René Steven, 11 Rue Carnot,
Armand Hellouin, 106 Rue Gravel,
Edmond Mille, 124 Rue Chevallier,
ĉiuj en Levallois-Perret (Seine), Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. (bfl).

S-o R. Horatlik, Kumzak 148, Ĉehoslovakio, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn. Tre serioza interŝanĝo.

Josef Buka, Nymburk, Smetanova 719, Ĉehoslovakio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj leteroin pri ĉiuj demandoj.

S-o Marcel Wottier, Haringrodestraat 54, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl).

Fraŭlo Maksimiljan Trenner, teknikisto, Wien II/1., Zirkusgasse 27/3, deziras korespondi pri radio-telegrafa, telefona kaj similaj temoj. Li estis tre okupita kaj petas siajn korespondantojn, skribi al li denove

S-o Alfonso Ceppellini, Via S Lucia 6 (quartieri 4), Firenze (Italio), deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl), poŝtmarkojn kaj papermonon.

S-o Richard Köhn, Stendal (prov. Sachsen), Grabenstr. 14 II, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Walter Griethe, Magdeburg, Kurze Strasse 1, Germ., deziras korespondi kun naturamikoj el ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Gustav Exner. Magdeburg, Wasserkunststr. 30, Germ., deziras korespondi kun idealaj samideanoj el ĉiuj landoj per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj. Interŝanĝas ankaŭ Esp. gazetojn.